Kiel aliĝi al UEA

in paradisum deducant te cōdex

aŭtoro Juha Metsäkallas · publikigita 2018-10-25

Kiam mi komencis ĉi tiun esperantohobion, mi aliĝis nur al la loka societo kaj tiel al Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) – aŭ mi supozas ĉi tiel. Almenaŭ mi ne aliĝis al Universala Esperanto Asocio (UEA). Mi rigardis neniun bezonon.

Kiam mi aŭdis, ke UEA aranĝas sian centkvaran universalan kongreson en Lahtio en 2019, mi tuj anoncis min kiel volontulo por organizaĵoj. Ĉi tio signifas, ke mi pasigos ĉirkaŭ du semajnojn venontsomere en Lahtio, plejparte en la kongresejo mem. Nu, por eniri en la kongresejon mi devas aliĝi al la kongreso kaj pagi la kongreskotizon – kvankam mi intencas labori kiel volontulo. Tio eble sonas iomete stranga, sed se vi pensas pri ĉi tio, kaj kiel ankaŭ KKS klare eksplikis, kiam ri vizitis Lahtion frue ĉi-aŭtune, la kialo estas simpla. Per ĉi tia proceduro oni certigas, ke volontuloj vere laboras volonte kaj ne en nomo de volonteco saviĝas el pagado. Al tiaj volontuloj, kiuj vere helpas, oni repagas parton de la kongreskotizo.

Do mi direktiĝas al la retejo de UEA por aliĝi. Aĥ, estas pluraj kategorioj de kongreskotizoj.

KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ (ĉiuj en eŭroj)	ĝis **2018.12.31** 1-a periodo		ĝis **2019.03.31** 2-a periodo		ekde **2019.04.01** 3-a periodo	
Aliĝkategorio	**A**	**B**	**A**	**B**	**A**	**B**
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)	190	145	240	180	290	215
2. ne individua membro de UEA	240	180	300	225	360	270
3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	95	70	120	90	145	110
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	145	105	180	130	215	155

Difinoj

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM aŭ DMJ), Membro Baza 2019+ (MB aŭ MB-T), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Aligitaj Membroj kaj Membroj kun Gvidlibro (MG) eniras kategorion 2, kiam temas pri kongresa kotizo.*

Mi estas aliĝonta antaŭ la jarfino, pro kio la verda kolumno taŭgas, kaj Finnlando apartenas al la A-landoj. Hm, se mi ne estas membro de UEA, la kotizo estas 240 eŭroj, sed por membroj nur 190. Mi rezonas, ke aliĝi al UEA mone valoras nur, se la membrokotizo estas malpli ol 50 eŭroj. Ete obskuraj estas tiuj diversaj membrokategorioj DM, DMJ, MB, MB-T, MJ, MJ-T kaj MG, el kiuj laŭ la tabelo la laste menciita ne rajtigas, ke oni pagu pli malaltan kongreskotizon. MG ŝajnas esti ia garantia membro sen rajtoj de la ordinara membro.

Mi decidas aliĝi. Mi trovas paĝon kun alternativoj por membrokotizo por la jaro 2019 (kaj antaŭen) kaj por la jaro 2018. Mi rezonas denove, ke mi devas elekti ĉi tiun 2018, ĉar mi estas pagonta la kotizon eĉ ĉi-jare por ricevi la rabaton de antaŭaliĝon. Mi supozas, ke por ricevi la rabaton oni devas esti membro precize en la momento de pagado – alie estus stulta.

Mi aliĝas al UEA/TEJO por la jaro **2019** ▼ ← klaku la jaron por ŝanĝi

Por aliĝi por la **2018-a jaro** bonvolu uzi aliĝilon 2018

Malfermiĝas la aliĝilo por 2018 kun surprizo. Per klaki la jaron oni povas aliĝi por la jaro 2017!



La grava demando laŭtiĝas: kio estas tiujn superbajn avantaĝojn mi ricevas, se mi aliĝas en la jaro 2018 por la jaro 2017?

Bone, mi aliĝu por la jaro 2018. Mi vadas tra ĉi tiuj membrokategorioj MG, MJ, MA, DMJ kaj DM. Iomete mi miras, kial la tabelo havas alternativon ”neniu”. Ĉu oni ne celas aliĝi? He, oni ne vere uzas la saman formularon por malaliĝi? La kategorio MJ ŝajnas esti taŭga por mi, kaj mi plenigas la formularon kaj elektas pagi per Paypal kaj… Ĉu? Ne aperas la konata Paypal-formularo sed anonco, ke la Centra Oficejo de UEA devas aprobi mian membrecon. Vere, ĉu ekzistas iu politburoo, kiu konstatas, ĉu mi taŭgas aliĝi?

Mi ricevas retmesaĝon, en kiu oni instigas min uzi la retpoŝadreson ”financoj@co.uea.org”, kiam mi pagas per Paypal. Krome oni rimarkigas, ke oni ŝarĝas aldonkoston de 5% en rilato de Paypal-pagadoj, sed oni ne ŝarĝas ĉi tiun aldonkoston, kiam temas pri membrokotizoj kaj almenaŭ ciuj aliaj pagoj al UEA. Kia stulteco! Ne funkcias Paypal ĉi tiel, aŭ klare oni *povas* uzi ĝin tiel, sed ŝajnas amatora, sterketa (fi. *kökkö*). Kutime oni metas flavan Donate-butonon, kiu kondukas rekte al Paypal kaj transigas necesajn informojn. Ĉi tiel funkcias ekzemple la donacobutono ĉi tie en la Finna babilejo. Krei la butonon estas infane facila. Kaj la aldonkosto, kiun oni grace ne bezonas pagi? Memorigas pri bazarkomercisto en turisma altirejo: ”Special price only for you”.

Mi restas atendi aproban anoncon de tiu mistika membrokomitato. Sed mi tediĝas atendi jam nur du, tri tagojn kaj malgraŭ ĉio pagas per Paypal al tiu retpoŝadreso. Nature mi ne tuj ricevas aŭtomatan konfirmon – sed mi ne plu eĉ atendas ĝin. Post kelkaj tagoj mi ricevas retmesaĝon, laŭ kiu mia membreco estas registrita kaj oni donas al mi UEA-kodon(*), kiu verŝajne malfermas la pordojn al Esperantuja paradiso: *In paradisum deducant te cōdex.* Malgraŭ la sistemo de aliĝo mi ŝajnas esti membro de UEA

Sekva fazo estas aliĝi al la kongreso…

*: Iomete amuza estas, ke mia kodo enhavas ne-esperantan literon ”q”.

La origina artikolo estas publikigita 2018-10-25 en la retejo ***Finna babilejo*** kun rubriko Kiel aliĝi al UEA. Ĉi tiu PDF-versio estas kreita 2021-01-11. Vidu

ankaŭ la aliajn afiŝojn de tipo artikolo, Esperantlingvaj.